

Asocio de la Verduloj Esperantistaj, AVE 2024-05

kunlaboranta fakasocio de UEA pri ekologio.

Parolas la internacian, neŭtralan lingvon Esperanto

Estontaj renkontiĝoj de AVE-anoj:

2024-05-08 Strasburgo, kunveno je EEK

2024-07/08, Arusha, Kunveno je UK

2025 UK

Okazis inter aliaj:

2023-08-01, 15:15 Torino, Kunveno je UK

2023-06 Incheon (KR), KEA & AVE ĉe movada foiro de Tutmondaj Verduloj: globalgreens.org

2023-05-26.. AVE ĉe Germana Eo-Kongreso

2022-06-03/06 Oldenburg (Old.) okaze de Germana & Nederlanda Eo-Kongresoj; gvid. vizito de marĉo.

2021 / 2022 virtuala UK, Belfast - Montreal

2021-05-21/24 virtuale Frankfurt & Slubice, okaze de Germana & Pola Esperanto-Kongresoj.

2021 AVE ĉe virtuala konsilio de European Greens.

2019-07-20 Lahti (FI), UK, kunveno de AVE

2019-07-11 BET, Panevezys (LT): prelego pri plastajhoj & akvaroj

2018-05-19 Antverpeno, konsilio de la Europaj Verdaj Partioj. AVE-informtablo je movada foiro

2017-03-30/04-02 Liverpool (GB), teamo de AVE ĉe la Tutmonda Kongreso de Verdaj Partioj: pri lingva justeco ene de la Verduloj: greens2017.org

2015-07-27 Lille, Francio, publika AVE-kunsido

okaze de la 100-a UK de UEA; temoj: Agendo 21 & Daŭropovo en la Esperanto-Movado.

Niaj Celoj: La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas malgranda Ne-Registara Organizaĵo; ni estas nura reto da homoj, neformala asocio. AVE-anoj parolas Esperanton kaj estas Verduloj (membroj aŭ simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian, socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon.

AVE pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke. Ni celas informi niajn geamikojn en politiko kaj en Civil-Sociaj Organizaĵoj (au NRO-oj) pri la avantaĝoj de Esperanto kaj ni informas niajn esperantistajn geamikojn pri la neceso de Verda Politiko.

Historio de AVE: AVE estis fondita 1984 en Liège (Belgio) okaze de la unua renkontiĝo de la Eŭropaj Verdaj Partioj, jen : verduloj.org/0_17/aveno_00.pdf

Kunlaboro: AVE kunlaboras kun UEA, SAT & diversaj Civil-Sociaj Organizaĵoj kaj kun la Verdaj Partioj de landa, kontinenta kaj globala nivelo.

Agado: Ĉar AVE vivas de la ligo inter la membroj, ni ŝatas ricevi de vi informojn, rilate al verda politiko en via lando por publikigi ilin en Aveno, nia bulteno. Ni tradukas gravajn tekstojn el/de/por la Verdaj Partioj kaj Verda Movado. Ĝi servas por reciproka informo. Temoj: Ekologio, Sociala Justeco, Homaj & Bestaj Rajtoj, nemilita konflikto-solvado: Bedaŭrinde la rusa prezidento preferis realigi sian deziron per milito; akaparis Krimeon kaj agresis Ukrainon. Ni subtenas la agresitan landon rehavi siajn limojn de 1994 !

Per-Esperanto-Agado:

UN lanĉis la 17 Celojn de Daŭrigebla Evoluo ĝis 2030 (CDE/ sustainable development goals, SDG). AVE sekvas ilin rilate edukadon, daŭripovon, rearbarigon - ĉi-kaze ni kunlaboras kun esperantistoj en pluraj landoj kaj subtenas iliajn evoluajn projektojn, ekzemple: "Mazingira Salama/Ketare" de Mramba Simba en nord-okcidenta Tanzanio;

: "Akvo por Kalima" kaj subteni samideanajn gestudentojn kune kun SBV, Goma, DR Kongo, informoj:

www.verduloj.org/afriko.htm

: Infanĝardeno kaj agroforsa ĝardeno en Rumonge

Ni subtenas per informado kaj tradukado la **Verdajn Partiojn tutmonde:** Deklaracio de Incheon 2023.

Ĉarto de la Tutmondaj Verduloj 2023; tiu de 2012 je <http://www.globalgreens.org/charter>

Kaj kunlaboras kun kelkaj landaj partioj, ekzemple en Francio : verduloj.org/welcome.htm#Verduloj

Civila Krizo- kaj Konflikto-Solvado (2 p.),

Programo de la Eŭropa Verda Partio, 2006;

Manifestoj de 2009 kaj 2014, Verdula Libro, Verda Frakcio de Europa Parlamento, 2004 - 2009.

: **Tradukas** gravajn tekstojn de **Ekologia Movado**

: 100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio.

: Plastaĵoj en la akvaroj & kemiaĵoj en la plastajhoj.

verduloj.org/dokument.htm

Por **membriĝi** al AVE vi ne bezonas esti membro de iu Verda / Verdula / Ekologia Partio, sed akcepti niajn Celojn. AVE havas ĉ. 300 membrojn.

Bonvolu informi nin se vi aktivus (pli aŭ malpli) en iu ajn NRO/CSO aŭ Verda Partio.

Bonvolu membriĝi en Verda Partio de via lando je:

globalgreens.org/member-parties/

Nia semajna bulteno: verduloj.org/aveno.htm

Kotizo: Nia jara kotizo estas 10 EUR. Plia donaco por nia evoluo-subtena agado bonvenas. Por UEA-membroj: nia Konto „**avex-z**“ Bonvolu mencii vian nomon kaj kion vi subtenas. Se vi ne estas membro de UEA bonvolu pagi al mia persona konto ĉe Volksbank Freiburg: BIC/SWIFT: GENODE61FR1 IBAN: DE31 6809 0000 0007 8681 11

AVE-sekretario: Mi invitas vin elkore, partopreni en nia agado kaj informi niajn ne-esperantistajn geamikojn en ekologio-socialaj (verdaj) partioj aŭ NRO/CSO-oj pri Esperanto.

Adreso: AVE, c/o Dr. Manfred Westermayer Weissdornweg 68

DE-53177 Bonn

AVE@Verduloj.org

Retejoj:

ĉefa: verduloj.org

eksperimenta: verdularo.com



AVE - la ligo inter Verduloj kaj Esperantistoj
Ni pensas tutmonde &
agas surloke kaj regione